

meritas mencion la apogo de la hungara preso : gazeto, revuo ĉiutaga, ĝenerala kaj faka, kiuj iom post iom ĉiam pli da artikoloj aperigas pri la Lingvo Internacia kaj pri ĝia kongreso. Kaj nun la invito de 51a U.K. pere de la hungara registaro laŭ propono de Hungara Esperanto-Asocio, estas klara argumento al ĉiuflanka apogo de nia afero.

Bone karakterizas la staton de la esperanto-movado en Hungario, interalie la tri Esperant-gazetoj : « Hungara Esperantisto » pri movadaj informoj, « Hungara Vivo » socia, kultura informo pri nia lando, « Hungara Fervojista Movado » kun sia tre varia envaho en bonega lingvo. Ĉiutaga 15 minuta-disaŭdigo esperantlingva en la hungara Radio. Krome la membraro de la Asocio en konstanta ritmo pliiĝas. Ankaŭ sur kampo de lerneja instruado de Esperanto aperas ĉiam novaj rezultatoj ; eĉ ankaŭ inter la pedagogoj estas bonvenita la ideo de Lingvo Internacia. Tiun laboron helpas la ŝtata eldonejo per aperigo de esperanto-lernlibroj. Menciinde, ke la hungara, en Mez-Europo, estas en lingva izoliteco kaj tiu situacio direktas la atenton, interesiĝon de la publikaro al Esperanto. Tamen la realigo de la eblecoj dependas de vigleco de la esperantistoj.

51a Universala Kongreso de Esperanto inter 30 julio-6 aŭgusto 1966. Ĝian programon certigas parte la kutimaj oficialaj eventoj pere de Universala Esperanto-Asocio kaj de diversaj fakaj asocioj, parte kulturaj, artaj kaj distraĵaj aranĝoj.

Por malferma kaj ferma solenaĵo servas la granda Sporthalo (Sportcsarnok), kiu ebligas la partoprenadon de plurmiloj da kongresanoj. La bela Kulturpalaco de Konstruista Sindikato (Mémosz), apud la Urboarbo (Varosliget), garantias la samlokan Kongresejon. Laŭ la projekto ĉi tie okazos la Ĝenerala Komitato —, kaj Labor-kunsidoj, ĉefe la Estrar-kunsidoj de U.E.A., krome la sidado de l'Esperanto-Akademio. Krome tie-ĉi havos lokon la Internacia Somera Universitato kaj la Konkuroj por Belarto, Oratoro kaj Foto. Samloke okazos la kunvenoj de la diversaj fakasocioj, scienculoj, juristoj, pedagogoj, fervojistoj, na-

turamikoj, ktp.

Grandiozan programon promesas la Arta Festivalo. En ĝia programo okazos : Hungara Vespero, debuto de hungara poplarto, la prezentadoj de l'Internacia Arta Teatro, Bulgara Esperanto-Teatro, Pola Esperanto-Teatro, Hungara Marioneto, Literatura Programo de Hungaraj Verkistoj, Programo de la Esperantistaj Verkistoj-Poetoj.

L.K.K. prizorgas ankaŭ distriĝon de la kongresanaro : balo en aŭlo de l'Ekonomicienca Universitato ; bankedo en Somera Restoracio Gundel en Urboarbo ; ekskursoj laŭplaĉe :

al 1) Miskolc-Aggtelek-Lillafűred en Nord-Hungario, 2) Kecskemét-Solt-Dunaujváros sur Granda Ebenajo, 3) Esztergom-Dunakanyar, historia urbo en pitoreska kurbiĝo de rivero Danubo, 4) Balaton-almádi, strandbanejo ĉe lago Balaton, « Hungara Maro ».

Samdate okazos la aranĝo de IIa Infana Kongreseto en arbaro Budai hegyek. Laŭ la decido en Budapeŝto okazos la 36a Kongreso de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj.

Laŭtradicie okazos la Antaŭkongreso. Ĝi estos aranĝata 27-30 jul. en universitata urbo Debrecen en Orient-Hungario sur Granda Ebenajo. Krom la oficialaĵoj la partoprenintojn distros balo kaj ekskurso al stepo Hortobágy.

Same al la tradicioj estos aranĝata la Postkongreso. Ĝia okazejo inter 7-9 aŭg. en universitata « urbo de sunbrilo » Szeged en Sud-Hungario. Ĉi-tie luksa programo atendas la partoprenantojn : urbovizito, ŝipekskurso, koncerto de orgeno, liberaera prezentado teatra, balo, folkloro programo.

L.K.K. invitas kaj la hungaraj esperantadeptojn de Esperanto, Lingvo Internacia ĉi-tistoj atendas kun tradicia gastamo la jare en Hungario.

M. L.